

## Notinterŝanĝo pri la Lusitania-afero

### La unua amerika noto

Berlin, la 17an de Majo 1915

La ĉi-tiea amerika ambasadoro prezentis al la ŝtatssekretario por eksteraj aferoj la sekvantan komunikon:

„Mi havas la honoron, transdoni al Via Ekscelenco la jenan kopion de telegramo sendita al mi de la amerika registaro.

Konsidere al la aranĝoj, kiujn la germanaj estraroj faris dum la lasta tempo, malrespektante la amerikajn rajtojn sur libera maro, kaj kiuj atingis la supron per la torpedado kaj surfundigado de la angla vaporŝipo „Lusitania“, la 7an de Majo 1915, ĉe kio pli ol cent amerikaj ŝtatanoj perdis la vivon, ŝajnas prudente kaj dezirinde, ke la registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko kaj la imperiestra germana registaro atingu perfekte klaran interkonsenton pri la seriozeco de l' situacio rezultanta el ĉi tio.

La surfundigo de la angla pasaĝera vaporŝipo „Falaba“ per germana submarboato, la 28an de Marto, ĉe kio dronis la amerika ŝtatano Leon C. Thrasher, plue la je la 28a de Aprilo farita atako de germana aviadilo kontraŭ la amerika ŝipo „Cushing“, la torpedado al la amerika ŝipo „Gulflight“, la 1an de Majo, per germana submarboato, ĉe kio minimume du amerikaj ŝtatanoj pereis, kaj fine la torpedado kaj surfundigo de la vaporŝipo „Lusitania“ estas serio da okazintaĵoj, kiun la registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj observis kun kreskantaj zorgo, maltrankvilo kaj konsterno.

La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj konas la humanan kaj civilizan sintenadon, kiun la imperiestra germana registaro ĝis nun montris ĉe aferoj pri la interpopola rajto kaj precipe en rilato al la libereco de l' maroj; ĝi konvinkiĝis pri tio, ke koncerne la interpopolrajtajn devojn la germanaj opinioj kaj la germana influo ĉiam protektis la justecon kaj humanecon; ĝi estas ankaŭ konvinkita pri tio, ke la ordonoj donitaj de la imperiestra germana registaro al ĝiaj maristaj oficiroj certe estas inspiritaj de la samaj sentoj de l' humaneco, kiel la marleĝoj de aliaj nacioj tion ordonas. Tial la registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj ne povis kredi, kaj ankaŭ nun ne povas decidiĝi kredi, ke tiuj ĉi aranĝoj, tiel absolute kontraŭantaj al la reguloj, kutimoj kaj al la spirito de la moderna militado, povis havi la konsenton aŭ aprobon de tiu ĉi granda registaro. Sekve de tio la registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj konsideras sia devo, turni sin pro tio al la imperiestra germana registaro kun la plej perfekta malkaŝeco kaj en la plej sincera espero, ke ĝi ne trompis sin, atendante de la imperiestra germana registaro agadmanieron, kiu forigos la bedaŭrindan impreson kaŭzitan per ĝiaj aranĝoj kaj restarigos la ĝisnunan sintenadon de la germana registaro rilate al la sanktigita libereco de la maroj.

La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj estas sciigita de la imperiestra germana registaro pri tio, ke ĝi pro la eksterordinaraj cirkonstancoj de la nuna milito kaj pro la aranĝoj farataj de siaj kontraŭuloj, kiuj celas senigi Germanujon de ĉiu komerca interkomunikiĝo, vidas sin devigata, uzadi la revenĝajn aranĝojn, kiuj multe superas la kutimajn metodojn de la marmilitado, proklamante militan zonan, ekster kiu resti ĝi estas avertinta la neŭtralajn ŝipojn. La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj havis jam okazon, sciigi la imperiestran registaron pri tio, ke ĝi ne povas permesi la enkondukon de tiuspecaj aranĝoj aŭ de avertoj pri ties danĝeroj al amerikaj ŝipanoj aŭ amerikaj ŝtatanoj, vojaĝantaj plenrajte kiel pasaĝeroj sur ŝipoj de militantaj ŝtatoj, kaj ke ĝi devas

severe respondi la imperiestran registaron pri ĉiu intencita aŭ hazarda malrespekto kontraŭ tiuj ĉi rajtoj. La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj ne povas kredi, ke la imperiestra registaro dubas pri ĉi tiuj rajtoj; ĝi kontraŭe opinias, ke la imperiestra registaro konsideras komprenebla per si mem la regulon, ke la vivo de nebatalantoj — ĉu ili apartenas al neŭtrala, ĉu al militanta nacio — laŭleĝe kaj juste ne povas esti endanĝerigata per la kaperado aŭ detruo al nearmita komercŝipo, kaj ke la imperiestra registaro same, kiel ĉiuj nacioj faras tion, rekonas la devon, uzadi la kutimajn aranĝojn de haltigo kaj esploro, por konstati, ĉu suspekta komercŝipo fakte apartenas al militanta nacio aŭ efektive entenas militan kontrabandon sub neŭtrala flago. La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj tial deziras tute serioze atentigi la imperiestran germanan registaron pri tio, ke la protesto kontraŭ ĝia nuna procedo, ataki la komercon de siaj malamikoj, konsistas el tio, ke estas praktike maleble, uzadi submarboatojn por la pereigo de l' komerco, ne malrespektante ĉe tio la regulojn de la konveneco, prudento, justeco kaj humaneco, kiuj estas konsiderataj devigaj de la moderna opinio. Estas efektive maleble por la oficiroj de submarboato, traserĉi komercŝipon sur maro kaj ekzameni ĝiajn dokumentojn kaj ŝarĝon; estas por ili fakte maleble, preni la ŝipon kiel prizon kaj, se ili ne povas provizi la ŝipon per priza ŝipanaro, ili ne povas surfundigi ĝin, ne transdonante la ŝipanaron kaj ĉion, kio troviĝas sur la ŝipo, al la vento kaj ondoj en malgrandaj savoboatoj. Ĉi tiujn faktojn ankaŭ la imperiestra germana registaro malkaŝe konfesas. Ni nun ekscias, ke ĉe la supre cititaj kazoj oni eĉ ne konsentis la necesan tempon, por uzi tiun ĉi plej elementan aranĝon por sekureco, kaj ke en minimume du el la cititaj kazoj eĉ ne okazis averto. Estas klare, ke la submarboatoj, kiel la okazintaĵoj de la lasta semajno montris, ne povas esti uzataj kontraŭ komercŝipoj sen neevitebla malrespekto al multaj sanktaj fundamentaj leĝoj de humaneco kaj justeco.

Amerikaj ŝtatanoj agas interne la limojn de siaj nedisputeblaj rajtoj, se ili sur libera maro direktas siajn ŝipojn ĉie tien kaj marvojaĝas ĉie tien, kien iliaj laŭleĝaj negocoj kondukas ilin, kaj ili uzas ĉi tiujn rajtojn en la certe tre pravigita konfido, ke ilia vivo ne estas endanĝerigata per agoj faritaj per evidenta malrespekto al ĝenerale aprobitaj internaciaj devoj, kaj certe ankaŭ en la konfido, ke ilia propra registaro helpos ilin en la praktikado de iliaj rajtoj.

Je mia bedaŭro mi devas komuniki al la imperiestra germana registaro, ke antaŭ nelonge en la gazetoj de la Unuiĝintaj Ŝtatoj estis publikigata formala, al la loĝantaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj direktita averto, kiu laŭdire devenas el la germana ambasadorejo en Washington, kaj kiu fakte eldiris, ke ĉiu civitano de la Unuiĝintaj Ŝtatoj, uzante sian rajton pri liberaj vojaĝoj sur la maroj, faras tion je propra risko, se lia vojaĝo kondukus lin en la zonon de la akvaroj, en kiuj la imperiestra militŝiparo uzas siajn submarboatojn kontraŭ la komerco de Granda Britio kaj Francujo spite de la respektplena, sed tre serioza protesto de l' registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj. La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj ne mencias ĉi tion, por direkti la atenton de la germana registaro al la surpriza kontraŭreguleco de la fakto, ke sciigo devenanta el la germana ambasadorejo turnas sin pere de la gazetaro al la loĝantaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj, sed nur por atentigi pri tio, ke averto pri ne laŭleĝa kaj ne konvena agado neniel povas esti konsiderata kiel senkulpligo aŭ malseverigo de tiu ĉi ago, nek taŭga, malpliigi la respondecon de ĝia aŭtoro.

La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj, kiu jam delonge konas la karakteron de la imperiestra germana registaro kaj la altajn principojn de la konveneco,

de kiuj ĝi estis animata kaj gvidata en la estinteco, ne povas kredi, ke la komandantoj de la ŝipoj, kiuj realigis ĉi tiujn ne laŭleĝajn agojn, povas esti farintaj tion alie ol malkomprenante la ordonojn donitajn de la germanaj maristaj estraroj. Ĝi supozas kiel kompreneble per si mem, ke en ĉiu tia kazo oni povas atendi almenaŭ en la sfero de la limoj de l' praktika ebleco, ke la komandantoj eĉ de submarboatoj farus nenion, kio endanĝerigas la vivon de nebatalantoj aŭ la sekurecon de neŭtralaj ŝipoj, eĉ je la risko, ke la kapero aŭ detruo al la koncerna ŝipo malsukcesus. Pro tio ĝi havas la konfidon, ke la imperiestra germana registaro malaprobos la agadojn, pri kiuj la registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj plendas, ke ĝi, kiom estas eble, donos kontentigon por nemezureblaj malutiloj, kaj ke ĝi tuj ordonos ĉion necesan, por malhelpi la ripetadon de okazoj, kiuj tiel evidente malrespektas la principojn de la militado, kiujn la imperiestra germana registaro en la estinteco tiel prudente kaj forte protektis.

La registaro kaj loĝantaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj atendas de la imperiestra germana registaro justan, baldaŭan kaj civilizan procedon en tiu ĉi priviva afero kun des pli granda konfido, ĉar la Unuiĝintaj Ŝtatoj kaj Germanujo estas ligitaj ne nur per apartaj ligoj de la amikeco, sed ankaŭ per specialaj deklaroj de la kontrakto de 1828 inter la Unuiĝintaj Ŝtatoj kaj la reĝlando Prusujo.

La esprimo de la bedaŭro kaj la propono de kontentigo okaze de la detruo de erare surfundigitaj neŭtralaj ŝipoj, kvankam ebla sufiĉaj por internaciaj devoj, se homaj vivoj ne estas priplendataj, tamen ne povas pravigi aŭ senkulpigi procedon, kies natura kaj necesa efiko estas, elmeti neŭtralajn ŝtatojn kaj personojn al novaj kaj nemezureblaj danĝeroj.

La imperiestra germana registaro certe ne atendas, ke la registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj lasos neparolita iun vorton aŭ neokazinta iun agon, kiuj estus necesaj por plenumi sian sanktan devon, protekti la rajtojn de la Unuiĝintaj Ŝtatoj kaj de iliaj ŝtatanoj kaj garantii iliajn liberajn uzadon kaj ĝuon.

Mi uzas ĉi tiun okazon, por denove certigi Vian Ekscelencan pri mia distingita atestimo.

(subskr.) *James W. Gerard*

Al Lia Ekscelenco

Sinjoro *von Jagow*, imperiestra ŝtatestro por eksteraj aferoj ktp. ktp. ktp.“

### **Responda noto de la imperiestra germana registaro**

Berlin, la 28an de Majo 1915

La subskribinto havas la honoron, respondi al Lia Ekscelenco, ambasadoro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko, Sinjoro James W. Gerard je la skribaĵo de la 15a nuna pri la malutilado al amerikaj interesoj per la germana submarboata milito la jenon:

La imperiestra registaro detale ekzamenis la sciigojn de la registaro de l' Unuiĝintaj Ŝtatoj kaj ankaŭ siaflanke nepre deziras kunlabori en sincera kaj amika maniero, por klarigi eblajn malkomprenojn, kiuj povus ekesti en la interrilatoj de ambaŭ registaroj per la okazintaĵoj cititaj de la amerika registaro. Unue, koncerne la aferojn pri la amerikaj vaporŝipoj „Cushing“ kaj „Gulflight“ jam estas komunikite al la amerika ambasadorejo, ke la germana registaro tute ne intencas atakigi en la militregiono per submarboatoj aŭ aviadistoj neŭtralajn ŝipojn, kiuj ne kulpigis sin per malamikaj agoj; kontraŭe, la germanaj batalfortoj ricevis diversfoje la plej pozitivajn ordonojn, evite atakojn kontraŭ tiaj ŝipoj. Se dum la lastaj monatoj, sekve de intermiksoj, neŭtralaj ŝipoj havis



malutilon per la germana submarboata milito, la afero estas pri tute sporadaj esceptaĵoj, kiuj estas kaŭzitaj per la flagofuŝuzo de la brita registaro kune kun senatenta aŭ suspekta konduto de la ŝipestroj. La germana registaro en ĉiuj kazoj, en kiuj neŭtrala ŝipo sen propra kulpo, laŭ la konstatoj faritaj de ĝi, suferis malutilon per germanaj submarboatoj aŭ aviadistoj, esprimis sian bedaŭron pri la malfeliĉa akcidento kaj, se tio estis motivita per la stato de l' aferoj, promesis kompenson. Laŭ la samaj principoj ĝi pritaktos ankaŭ la aferojn de la amerikaj vaporŝipoj „Cushing“ kaj „Gulflight“; pri tiuj ĉi aferoj funkcias esploro, kies rezultato en plej proksima tempo estos komunikata al la ambasadorejo, kaj kiu eventuale povus esti kompletigata per internacia esplora komisiono laŭ titolo III de la Haaga interkonsento pri paca forigo de internaciaj konfliktoj de la 18a de Oktobro 1907.

Ĉe la alfundigo de la angla vaporŝipo „Falaba“ la komandanto de la germana submarboato havis la intencon, doni al la pasaĝeroj kaj al la ŝipanaro plenan okazon por ilia savo. Nur kiam la ŝipestro ne plenumis la ordonon, haltigi la ŝipon, sed forrapidis kaj alvokis helpon per raketsignaloj, la germana komandanto unue ordonis per signaloj kaj paroltubo al la maristaro kaj pasaĝeroj, forlasi la ŝipon dum la daŭro de dek minutoj; efektive li lasis al ili tempon de dudek tri minutoj kaj elpafis la torpedon nur, kiam suspektaj marveturiloj alrapidis, por helpi al la „Falaba“.

Koncerne la perdojn de homvivoj ĉe la alfundigo de la brita pasaĝera vaporŝipo „Lusitania“, la germana registaro jam esprimis al la koncernaj neŭtralaj registaroj sian sinceran bedaŭron pri tio, ke anoj de iliaj ŝtatoj perdis sian vivon ĉe tiu ĉi okazo. La imperiestra registaro cetere ne povas sin senigi de la impresoj, ke certaj gravaj faktoj plej senpere interrilatantaj al la surfundigo de la „Lusitania“ ne povus esti atentataj de la registaro de l' Unuiĝintaj Ŝtatoj. Tial ĝi en la intereso de la de ambaŭ registaroj celata klara kaj plena interkonsento opinias necese, unue konvinkiĝi pri tio, ke la sciigoj konataj de ambaŭ registaroj pri la stato de l' afero estas kompletaj kaj akordiĝantaj unu kun la alia.

La registaro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj eliras de la vidpunkton, ke la „Lusitania“ estas konsiderata kiel ordinara, nearmita komercŝipo. En ĉi tiu interrilato la imperiestra registaro permesas al si, atentigi pri tio, ke la „Lusitania“ estis unu el la plej grandaj kaj plej rapidaj, per registaraj rimedoj kiel helpkrozŝipoj konstruitaj anglaj komercŝipoj, kaj ke ĝi estas eksprese citita en la „Navy List“, eldonita de la angla admiralitato. Krom tio estas konate de la imperiestra registaro el fidindaj eldiroj de ĝiaj oficistaroj kaj de neŭtralaj pasaĝeroj, ke jam de sufiĉe longa tempo preskaŭ ĉiuj iom valoraj anglaj komercŝipoj estas provizitaj per pafitegoj, municio kaj aliaj bataliloj kaj per personoj speciale spertaj en la servado ĉe la pafitegoj. Ankaŭ la „Lusitania“, laŭ de ni konataj sciigoj, ĉe la forveturo el New York surhavis pafitegojn, kiuj estis kaŝe starigitaj sub la ferdeko.

La imperiestra registaro plue havas la honoron, direkti la specialan atenton de la amerika registaro al tio, ke la brita admiralitato rekomendis al sia komercŝiparo en sekreta ordono de Februaro nunjara, ne nur serĉi ŝirmon post neŭtralaj flagoj kaj insignoj, sed eĉ sub tiu ĉi maskiĝo atake procedi per ramado kontraŭ germanaj submarboatoj. La brita registaro ankaŭ promesis kaj eĉ jam pagis altajn premiojn, por speciale instigi komercŝipojn al pereigo de germanaj submarboatoj. Konsiderante ĉi tiujn faktojn, sen ia dubo konatajn de la imperiestra registaro, ĝi ne plu povas rigardi kiel „nedefendatan regionon“ anglajn komercŝipojn sur la marmilitejo montrita de

l' admiralstabo de la imperiestra germana militŝiparo; sekve de tio la germanaj komandantoj ankaŭ ne plu povas plenumi la regulojn alie kutimajn por la markapera rajto, kiujn ili antaŭe ĉiam obeis. Fine la imperiestra germana registaro devas speciale atentigi pri tio, ke la „Lusitania“, kiel jam antaŭe, tiel ankaŭ dum sia lasta vojaĝo surhavis kanadajn trupojn kaj militmaterialon, inter la lasta ne malpli ol 5400 kestojn da municio, kiu estis destinita por la pereigo de bravaj germanaj soldatoj plenumantaj sian devon en la servo por la patrolando kun sinofera kuraĝo kaj sindono. La germana registaro opinias agi en ĵusta memdefendo, se ĝi per la disponeblaj al ĝi militrimedoj povas ŝirmi la vivon de siaj soldatoj per pereigo de la municio destinita por la malamiko. La angla ŝipvetura societo devis konscii la danĝerojn, al kiuj la pasaĝeroj sub tiuj ĉi cirkonstancoj estis elmetataj. Akceptante ilin spite de tio sur la ŝipo ĝi kun plena pripensado provis uzi la vivon de amerikaj civitanoj kiel ŝirmon por la transportata municio kaj sin meti en kontraŭdiron al la klaraj reguloj de la amerikaj leĝoj, kiuj absolute malpermesas kaj per puno minacas la transportadon de pasaĝeroj sur ŝipoj surhavantaj eksplodaĵojn. Per tio ĝi en krima maniero faris sin kulpa pri la morto de tiel multnombraj pasaĝeroj. Laŭ la ekspresa sciigo de la koncerna submarboata komandanto, kiu nur estas certigata per ĉiuj aliaj sciigoj, ne povas ekzisti ia dubo pri tio, ke la rapida pereco de la „Lusitania“ unuavice estas klarigebla per la eksplodo de la municia ŝarĝo kaŭzita per la torpeda pafo. Alizake la pasaĝeroj de la „Lusitania“ laŭ homa supozo estus savitaj.

La imperiestra registaro opinias la ĉi-supre cititajn faktojn sufiĉe gravaj, por rekomendi ilin al atenta ekzameno de la amerika registaro. La imperiestra registaro, rezervante al si definitivajn decidojn pri la postuloj, faritaj sekve de la surfundigo de la „Lusitania“, ĝis la alveno de respondo de la amerika registaro, opinias fine, en tiu ĉi loko devi atentigi pri tio, ke ĝi siatempe kun kontentigo informis sin pri la peraj proponoj, kiuj flanke de la amerika registaro estas faritaj en Berlin kaj London, por prepari *modus vivendi* por la marmilitado inter Germanujo kaj Granda Britio. La imperiestra registaro tiam sufiĉe pruvis sian bonan volon per volonta konsentado pri tiuj ĉi proponoj. La efektivigo de tiuj ĉi proponoj malsukcesis, kiel estas konate, pro rifuza sintenado de la grandbrita registaro.

Petante Lian Ekscelencon Sinjoron la ambasadoron, sciigi la ĉi-supran respondon al la amerika registaro, la subskribinto uzas ĉi tiun okazon, por denove certigi al Sinjoro la ambasadoro sian distingitan atestimon.

(subskr.) *Jagow.*

Al Lia Ekscelenco

la ambasadoro de la Unuiĝintaj Ŝtatoj de Ameriko Sinjoro *Gerard.*

## El la germana ĉefstabejo

### Respondo al la rusa ĉefstabo

La rusa aserto, ke la kruelaĵoj, laŭdire faritaj de la germanoj, estas tro multnombraj por allasi konstatojn pri detaloj, estas sensenca kalumnio pri la germana armeo kaj same oportuna kiel banala elturniĝo por kaŝi la mankon de pruvmaterialo.

La rusa armeestraro do estas petata, por ĉiu unuopa kazo sciigi lokon, tempon kaj ceterajn detalojn.

Ĝis nun ja ĉiu rusa gazetraporto pri germanaj kruelaĵoj, kiom ajn esploroj estis eblaj, pruvigis kiel mallertega mensogo.

Eĉ la sumo de 75 000 Rubloj, dis-